



NORDHUNGARIA INFORMO

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc**

Decembro 2008

3. évfolyam 40. szám

DECEMBRO	3
La 2008-a, estas Jaro ankaŭ de la BIBLIO	3
Se iu vin	4
Tombo de Zamenhof	5
Kristnasko.....	6
ŜERCO	8
Vero, ne ŝerco estas	9
GABRIELO BERETI	10
Travivaĵo el Malmö	10
MAHADEVA KAJ LA UNUA VIRINO	11
Ildikó Király, sinjorino Dr. Vu	16
TEMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO	20
Nova estraro de Hungaria Esperanto-Asocio	22
Historio de la esperanto movado en urbo Miškolc.....	23
Karaj niaj legantoj!	25
Ĉevalo – homa sklavo	25
Lernejoj ĉevalaĵoj de lernanto Moriĉjo	26
BONDEZIROJ	27
Mi al mi diras	28

DECEMBRO

Karaj niaj legantoj!

Ni, - redaktantoj kaj kunlaborantoj de ĉi- gazeto – pridecidis, ke en tiu ĉi monata gazeto ni akomodigos al al Kristnasko: la pieta festo de amo. Ni klopodos aperigi tiujn verkojn, pri kiuj vi eble jam aŭdis, Multuloj certe jam ankaŭ legis, sed certe tre volonte legos nun.

Nia principo estas. pli bonas doni, ol ricevi. Ni esperas, la nun por legi proponataj verkoj gajnos vian plaĉon kaj vi pardonos, ke, pro vidkapablaj problemoj de la redaktantoj, ĝis ĝia solvo, **nia gazeto la NORDHUNGARIA INFORMO aperos alimaniere ekde la 2009a.**

Ni aperigos ĝin nur en la paraj monatoj!

Do, la unua 2009. jara numero estos la februara NORDHUNGARIA INFORMO!

Ni petas vin, ankaŭ en la estonto bonvolu priatenti niajn dirindaĵojn, kaj sendu daŭre literaturaĵojn el viaj propra nacia- kaj la esperanto literaturo, sciigojn: pri gravaj eventoj de vivoj de la vialandaj homoj kaj de esperanto-movado, interesaĵoj ks.

Ni nun kaptas la okazon por mencii, ke:

La 2008-a, estas Jaro ankaŭ de la BIBLIO

La BIBLIO, kiun multaj homoj manpremas ĉiutage, estas la plej disvastiĝanta kaj la plej grandnombre eldonita libro de la mondo, ĉar ĝi estas multmiljara kulturhistoria kaj literatura dokumento de historio de la homaro, kiu sentigas sian efikon ekde sia estiĝo ĝis nun.

Ĝi efikis al la socio, influis la pensadon, ĝi servis kiel atestilo de la potencpolitikaj militoj, inspiris la literaturon kaj la artojn.

La **BIBLIO** estis estiĝanta dum ĉ. unu kaj duonmil jaroj (inter la 6. jarcento a.Kr., kaj la 9. jc. post Kristo), kolekto estas de skribaĵoj, libretoj, al sanktaj deklaritaj (ĉar ili estas de Dio inspiritaj tekstoj), pere de diversaj eklezioj; (la nomo Sanktaskribaĵo devenas de tie), per enhavo parte historieta-instrua, parte poet-profeta. La teksto de la Biblio ne rigardeblas aŭtentika, pro la intertekstaj kontraŭdiraĵoj.

La Malnova-Testamento kreiĝis dum la I-a jarmilo antaŭ Kristo. La Nov-Testamento estiĝis dum la unuaj jarcentoj post Kristo.

La Juda religio vidas supernaturan revelacion en la unua, la kristanismo en ambaŭ Testamentoj.

La Judoj havas la hebrean lingvan biblion (Toraon), la Kristanoj havas la greklingvan.

L. L. Zamenhof esperantigis la hebrean biblion.

El la hungara urbo Gönc (Goenc) Károli Gáspár (1529-1591, Gasparo Karoli): kalvinana pastoro hungarigis unue la tutan Biblion en 1590, kaj li perfektivigis per ĝi la progresantan postulon de la reformacio; la nacilingvan bibliotradukon.

Ĉi Biblio famiĝis kiel „Biblio de Vizsoly” (Biblio de Viĵoj), ĉar ĝi estis presita tie. Ankaŭ nuntempe ĝi estas rigardebla en la Kalvinana preĝejo en vilaĝo Vizsoly.

La historio de Gönc kaj Vizsoly, legeblas esperantlingve sur la retejo www.hungario.hu

La du partoj de Biblio enhavas inter multoj:

La moralan mondkoncepton de la antikvaj-epokaj popoloj, (vidu la ŝtonan Dekalagon de Moseo), kaj la instruojn kaj ekzemplodonajn parolojn konstruatajn sur tiu.

La Biblio prezentas: la diversajn eventojn de historio de Hebrea popolo (La Kreohistorion de la mondo, la salŝtoniĝon de Lót,, la detruigiĝon de Ninive la kulpa urbo, la flankosubfalono de Jerikó, historion de Noao kun la diluvhistorio, la egiptujan malliberecon kaj la ĝin sekvantan migradon en la dezerto), **krome parolas** pri la unua homparo Adamo kaj Eva, pri la ĉiutagaj penoj de la publiko, pri la temploj, pastroj, pri la popolon gvidata Moseo,, pri la riĉeco de la ĉefurbo Jerusalemo (en la Esperantlingva retbiblio en la II-a Libro sur la 808-812-aj paĝoj ni povas legi pri la multegaj multekostaj ŝtonoj, juvelŝtonoj, cedro, marmoro, kupro enkonstruitigitaj en la jerusaleman templon de reĝo Salamono), pri la riĉhava, 40 jarojn reganta reĝo Salamono (en la esp. Biblio II-a libro 9-a ĉapitro ni povas legi pri tiu en la skribaĵo de profeto Natan), pri krueleco de reĝo Herodo. Poste pri la teritoriokonkeroj kaj la tie minitaj diversaj mineraloj, ercoj, juvelŝtonoj kaj la al ilia apliko konjektintaj miskredoj.

Krome la Biblio temas pri interesaj kreskaĵoj (inter ili pri la cedro kiel konstruelemento), pri la pastra biborkolora-vestaĵo, pri kutimoj (inter ili pri la amaj-amoraj-amuziĝaj, punaj), pri estimo de gepatroj, pri adoro de la „Orbovido”, pri vivo de Jesuo kaj liaj sekvintoj, pri ŝanĝiĝoj de la klimato (oni povis trapasi la Ruĝan maron sekpiede), pri la surĉielaj okazaĵoj, (ekzemple: la panikon vekantan surĉielan fajroglobon, la eksterordinaran stelon kio vojmontris al kripo de la novnaskita Jesuo, kaj je la torturmorto de Jesuo okazinta sunmalpliigo-sunmalapero-tutmalheliĝo.

Do, resumante la BIBLIO enhavas la historipriskribon de la Antikvaepoka Oriento, la rememorojn pri vivo, miraklofaroj, instruoj, krucmorto de Jesuo, naskita en ties mondon kaj la kredon en Dio, kiu loĝas en ĉiu homa koro.

Nur hebrea kaj kristana Biblio ekzistas. Sed ni devas scii, ke havas ankaŭ aliaj popoloj sanktajn religiajn verkojn. Tiuj-ĉi estas la **KORANO** kaj la **VEDOJ**.

Mesaĝo de Jaro de Biblio estas: „Ĝojas kiu legas ĝin.”

Adrienne Pásztor

Doktoro Ferenc Jáki Se iu vin

Se iu vin
 presentas:
se iu vin
 atendas:
se iu vin
 alvenas:
se iu vin
 gardemas:
se iu vin
 atentas:
se iu vin
 defendas:
kvazaŭ fronde

vi nestas:
do jen:
Feliĉo estas!

(Ferenc Jáki/Marianna Legányi: Kantante Vivi – Szolnok
2006)

Tombo de Zamenhof

La 15a de decembro, estas naskotago de d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof. El tiu-ĉi kazo ni prezentas al vi tombmonumenton de li. Dumjare multoj ŝatintus scii, inter kiuj cirkonstancoj estas trovebla la tombmonumento, de la kreinto de nia esperanto-lingvo.

Al mia demando, la varsoviaj esperantistoj trankvilige diris al mi, ke la tombmonumento kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas bone prizorgata. Jen, la ricevita letero de Irek Bobrzak de la Esperanto Klubo Varsovia Vento, kaj la de li senditaj fotoj. La bildojn fotis samideano Andrzej Sochaczki.

„Saluton Adri!

Vi povas dormi trankvile :) La tombon kun la monumento de L.L.Zamenhof mi ne devas serĉi. Gxi estis kaj restas en Varsovio. La loka esperantistaro zorgas pri gxi kaj gxia cxirkauxajxo. Ni ne forgesas pri Ludoviko.

Mi ne scias, kion prezentas menciita foto. En Varsovio estas ne unu, sed kelkaj judaj tombejoj. En Pollando ili multas. Fakte, pro manko de vivantaj familianoj, plej forte kauxzis la nazioj, ne cxiuj estas prizorgitaj. Laux la pola legxo la tombejoj estas la juda posedajxo. Tamen, se temas pri la "zamenhofa", multe zorgas pri gxi asocio de sxatantoj de la juda kulturo. En la tombejo trovis sian lastan ripozon multaj personoj, kiuj grave kontribuis la polan kulturon, historion. Pro tio do, ke la judoj pri gxi ne deziras okupigxi, la poloj oficiale transprenis la taskon. La asocio provas zorgi ne nur pri tiu tombejo.

Mi aldonas aktualajn, faritajn tri semajnojn antaŭe, fotojn de la majstra monumento. Inter ili krome vi trovos memortabulon de Zofia kaj Lidia, kiu troviĝas sur la tombo de Klara (foto 10). Sed Lidia ne estas cxi tie. Fakte sxi murdigita estis en la nazia koncentrejo Tremblinka.

Vi vidos cxe la monumento kaj la tabulo florojn, kiujn same kiel kandeloj fakte oni malpermesas meti en la judaj tombejoj. Tamen la esperantistoj trovis solvon. Simple la florojn ni plantis. Tion oni ne malpermesas :)

Fotojn de la tombejo troviĝas ankaŭ cxe la pagxaro de Varsovia Vento, sed nun gxi estas en stato de rekonstruo do la pagxo kun ZEOj atingeblos plene pli malpli post monato.

Koraj salutoj!
Amike,
Irek Bobrzak”

(Adrienne, s-ino Pásztor)



Kristnasko

La 25-an de decembro, ni festas kiel naskotagon de Jesuo, laŭ la kristana kredo. Multuloj tiel opinias, ke tiu estis tiel ĉiam. Ne, ni devas kontraŭdiri koncerne la daton. Oni festis printempe la naskotagon de Kristo, tute ĝis la kvara jarcento. Tiam, la papo Julio la unua, decidis pri tio, ke ekde tiam la kristanoj festu naskiĝtagon de Jesuo, dum la vintra solstico, laŭ la romia kalendaro. La kialo de la decido estis, ke tiutempe eĉ multoj kantis la sunhimnojn laŭdante la praan Sundion, kaj la popolon devis elpreni de ties efiko. Tiamaniere liberiĝante pri ties efiko, estiĝis la 25a de decembro vera, kristana festo.

Misterio de Kristnasko: la nasko de la Difilo inspiris la plej diversajn artojn, verkistojn de ĉiu popolo, ankaŭ de Hungaroj.

Ni konas tre belajn verkojn de la hungaraj verkistoj: Aleksandro Petőfi, Johano Arany, Géza Gárdonyi, Endre Ady, Miĥaelo Babits, Deziderio Kosztolányi, Árpád Tóth, Ludoviko Áprily...ks.

Iliaj verklinioj estas korpreme karaj, pri kiuj ankaŭ nia koro pleniĝas per dankemo, ke ni povis ekvivi tiun tagon kune kun ĝojante kun niaj geamatoj, gekaruloj.

Adrienne Pásztor

Kristnasko

Endre Ady (1877-1919)

I.
 Sonorilo.
 Kanto-trilo
 flugas danke al la foro,
 en vilaĝo kara mia
 je Kristnasko
 introspektas ĉiu koro.

Ĉiu homo
 kun adoro
 kaj honoro klinas kapon,
 en vilaĝo kara mia
 la Mesio
 nun alportas veran amon.

Tre feliĉe
 al kirk' vice
 junaj, oldaj homoj venas,
 en vilaĝo kara mia
 Dion de la
 Univerŝo ĉiuj benas.

Kvazaŭ graco
 kaj la paco
 de l' Sinjoro flugas pie,
 en vilaĝo kara mia
 en la koroj
 bono, amo loĝas ĉie.

II.
 Mi ne ŝatas la grandurban
 bruon, ho ne!
 Festi hejme en silento
 estus bone!
 Estus bone preĝi — kiel
 antaŭlonge —
 elanime;
 trankviligi plene, fine.

Estus bone: al forgeso
 min altrudi,
 ree infanmaniere
 ludi, ludi;
 kun infana fid' kontrakti
 kun la mondo
 veran pacon,
 en la amo trovi gracon.



III.
 Se realo iĝus
 la kristnaska songo,
 al la mond' alvenus
 feliĉiga ŝanĝo.
 Se l' falema homo
 iĝus hom' refoje,
 estus por ĝi tiam
 talisman' survoje.

La surtera vivo
 Golgota ne estus,
 kaj la Univerŝon
 granda fort' penetrus;
 oni ne konfesus
 nur ĉi religion:
 ami ĉiujn homojn,
 kaj adori Dion...
 Se realo iĝus
 la kristnaska songo,
 al la mond' alvenus
 feliĉiga ŝanĝo.

El la hungara:

Julio Varga

Jag vet var glädjen har sitt hem, när jordens
 prakt förgår; ännu som förr från Betlehem ett
 livets bud mig når.

Jag vet ett träd så friskt och grönt, när dö-
 den råder här; På Golgata det blommar skönt, och
 evig frukt det bär. Ps 203.

God jul och ett välsignat nytt år

Red.

Poemon de la hungara poeto Endre Ady, tradukita de Julio Varga, sendis la bibliotekistino s-ino Anna Marosvölgyi, de la Landa Fremdlingva Biblioteko Budapeŝto.

ŜERCO

Sonorilego

En iun etan vilaĝon pastro alvenas. Li konsternante spertas, ke la tagmeza sonoriligado forrestis. Li vokas la sakristianon kaj demandas tiun kial ne okazis sonoriligado.

- Do, frato paroko, ĝi havas mil kaŭzojn – diras la sakristiano.
- Diru almenaŭ unu akcepteblan kaŭzon!- petas la paroko.
- Nu, ekzemple: ne estas sonoerilego...

Utilo de la fumado

Aj, sinjoro doktoro, ne volu konvinki min pri la malutilo de la fumado! Mi asertas, ke la fumado estas treege utila por mi.

- Ne diru tion!
- Sed jes, ĉar kiam ajn mi ekfumus, mia bopatrino prenas la ĉapon kaj foriras.
/La ŝercojn de la (Kacagó – Vicc újság)ŝercogazeto esperantigis László Pásztor/





1, La prezentitajn bildojn fotis d-ro Iván Bujdosó, la fotojn sendis s-rino Ilona Böde. La fotoj estis faritaj, en la Landa Fremdlingva Biblioteko (OIK) en Budapeŝto, okaze de la prezento de la dua volumo de la „Fajszí Kolekto”, la 26-an de septembro 2008a.

Jen, la fotoj:

- 1, Sur la Galerio de OIK estas videblaj la bildoj de la ĝuste al ĉi evento kreita ekspozicio, ĉi estas pri Zamenhof.
- 2, Jen, la prezento de novaj libroj el la libraro de OIK
- 3, Instruistoj, lernolibroj kaj lerneblecoj pere de la reto
- 4, En la Lingvostudio de OIK. La aŭdantoj de la libroprezento. Fotos: s-ro d-ro Iván Bujdosó.
- 5, La aŭdantaro. Antaŭe sidas la ĉefdirektantino de OIK, apud ŝi sidas s-ro Zsebeházy, György, kiu estas la redaktoro de la du volumoj de Katalogo Fajszí.
- 6, Sinjoro d-ro profesoro Endre Dudich (Dudiĉ), kiu entreprenis grandegan parton („leonparton”) el la aperigeblecoj de la dua volumo de Katalogo Fajszí, kaj li ankaŭ prezentis ĝin.

(S-rino Ilona Böde OIK-/ S-rino Adrienne Pásztor).

Vero, ne ŝerco estas

La kuracisto

Virino mezaĝa vizitis la dermatologon.

- Tre jukas mia mankavo, - diris ŝi.
- Kiu?
- La dekstra.
- Tiam, vi elspezas monon.
- Bonvolu neŝerci.
- Do, bone, bone. Kaj ĉu ĝi havas ankaŭ humidiĝadan kapablon?
- Ne.
- Tiam, vi ne nerviĝu. Okazas nenia malbono, ja ĝi estas nur ludo de la maljuniĝada haŭto.

(La virino havis gravan ekzemon, nur la kuracisto ne rekonis la malsanon.)

Adrienne Pásztor
(Rev. Teodoro Andreas)

Gabrielo Bereti

Travivaĵo el Malmö

En dua duono de septembro en 2008 oni aranĝis en la svedia Malmö la 5. Eŭropan Socialan Forumon. La Forumo, kiel aludas ties nomo ankaŭ tiun, estas eŭropea renkontiĝo de la pri socialaj demandoj okupantaj sociaj kaj civilaj organizaĵoj. La po du jaran aranĝaĵon partoprenis pli ol dek mil homoj el ĉiuj landoj de Eŭropo por ŝanĝi ideon kaj por voki la atenton por demonstrado al la demando.

La interesiĝantoj okaze de tiu povis elekti el inter pli ol cent seminarioj de pli ol cent temoj. Mi vidis ĝoje, ke antaŭtagmeze de la lasta tago oni aranĝis tiun seminarion, ties tempo estis estonto de la eŭropa lingva kunvivo. Mi estis scivola kiel esperantisto, ĉu mi renkontos laŭ rigidiĝinta kutimo de la mondo ĉieliron de la angla lingvo?

Ankaŭ nun ĉiu komenciĝis tiel, kiel tion ĉi tiam ni povis kutimi. La angla devena preleganto angle komencis konigi lian malpli ampleksan prelegon. Sed antaŭ komenco de la 40-50 persona konsilado – kio estas ĉi tie averaĝa frekventeco – mi konatiĝis kun du hungaraj esperantistoj. La iun oni nomas al Baltazaro / lian familian nomon bedaŭrinde mi forgesis/. La alia estas Veronika Heé, kiun mi jam pli frue konis laŭ nomo. Ni ekĝojis unu al alia, ni informiĝis unu pri alia, poste kreante iun etan improvizitan esperantistan insulon ni okupis lokojn en la ĉambrego atendante.

Ni aŭskultis anglalingvan prelegon de la angla preleganto. La prelego post la komencaj salutoj komencis diferenci de la kutima. Li diris, ke nun parolas angle, pro tio ĝi estas natura. Li diris, ke kie /en kiu universitato, ekde tiam/ li okupiĝas pri lingvaj demandoj kaj kiom da lingvoj li konas ankoraŭ? Inter la denombritaj lingvoj ĝoje ni aŭdis ankaŭ Esperanton. Poste li emfazis, ke li kiel lingvisto spertis baze de propra ekzemplo, ke kiu ajn kiom ajn lingvojn ellernas, ne estas kapabla esprimi sin klarsence, samnivele 4 kaj nuance tiel, kiel tion povas fari pere de la gepatra lingvo.

Dume li parolis, kelkaj personoj venis en la ĉambregon. El inter tiuj kelkaj personoj havis insignon, sur kiu estis verda stelo de Esperanto. Ni kapbalancadante ekrigardis signifoplene unu al alia.

Nia preleganto ilustris sian aserton per ekzemploj el terenoj de la scienco kaj arto. La homo kapablas kompreni sin, kompreni la mondon nur pere de sia gepatra lingvo. El ĉi tiu vidpunkto ne estas malgrandaj kaj grandaj lingvoj, nur estas gepatra lingvo kaj ellernitaj lingvoj. Ĉi tio ankaŭ ne estas miraklo, ja la gepatra lingvo havas minimume dekjaran, aŭ plurfoje dekjaran avantaĝon. Ĉi tio estas jam neatingebla avantaĝo.

En la vivo ĉio havas krom la ekzerca signifeco – kiel li diris – ankaŭ simolan intelekton. Tion li komprenis tiam, kiam paroladis kun iu lia irlandia amiko. Laŭ la anekdoto, kiam demandis lian konatulon, kiam komencis kiel anglogepatralingva homo ellerni la irlingvon, ja irlingve /malgrandlingve/ malnulte da homoj parolas. La amiko respondis: tial, ĉar post mia morto mi deziras atingi al paradizo de la irlingvanoj. La aŭskultantaro ridis, sed la preleganto pensante tiel, ke la aŭskultantaro unue ne komprenos la diritajn aferojn, serioze daŭrigis: mia irlandia amiko respondis ĝuste kaj simolan intelekton de lia respondo mi rekonis tiam, kiam ni paroladis esperantlingve. Ja estas evidenta, se la homo atingas paradizon de iu alia gepatra lingva popolo kaj la homo ellernas la esperanton kaj ne parolas gepatrolingve, sed iu neŭtrala perantolingve, tiam la homo atingas paradizon de la homaro. Lia logiko atingis min kiel la fulmobato. Li elmetis el lia poŝo iun kartofolion, kion montris al ni. Nome Esperanto estas la plej facile ellernebla lingvo de la mondo kiel gepatra lingvo de la homaro. Nome ĝia gramatiko estas metebila sur iu kartofolieto. La aŭskultantaro miris kaj entuziasmiĝis. Post unu momento la publiko ekaplaŭdis. Subite ĉiu parolis kaj gestadis. Tiel ŝajnis, ke ni ne

komprende unu la alian, tamen ĉiuj sentis, ke nun eta miraklo okazas kun ni, ĉar ekkomprenis la verecon kaj travivis savantan ekstazon de la libereco.

Tiam mi sentis tion, ke estas espero kaj ankaŭ ekde tiam mi portadas la neatendite realiĝintan travivaĵon de la liberecospiro, kion nun mi transdonas al vi, al miaj karaj legantoj kiel kuraĝigo, ĉar kvankam por la de lingvaj kaj sociaj zorgoj turmentita homaro estas terura tasko la laboro de la liberiĝo, sed tamen estas espero! Estas espero, ĉar ekzistas Sociala Forumo kaj ESPERANTO !

Esperantigis László Pásztor

Julio Baghy
MAHADEVA KAJ LA UNUA VIRINO
HINDA FABELO

M a h a d e v a, la pradio,
tre tedita de l' N e n i o,
post decido kreon ludis:
La M a l p l e n o n li plensutis...
Li, la magiisto spaca,
prakoleg' de l' foirplaca,
sunon, Lunon aperigis,
fajrajn diskojn diskurigis...
Tiel – por pli iluzia
piroteknikaĵo dia –
steloj en senlima vasto
tien reen kun lumkvanto
spiralmove dancis febraj
sur mil vojoj nevideblaj.
Jene en la densa nigro
komenciĝis ŝvebo, migro,
en koloroj tre diverse
radiadis L u m' disperse,
kaj trabilis dia H e l o.
Preta estis la Ĉ i e l o.

Mahadeva, la pradio,
jam el astra M a t e r i o
knedis T e r o n, nian mondon.
Li skulptadis valom, monton,
elkavigis lagon, maron,
fingre boris la grotaron,
poste grace sur surfacon
disen donis di-donacon:
al aero—blukoloron,
al ebena—herbon, floron,
al la valo – la profundon,
al montalto – neĝabundon,
al la maro – tajdan kreskon,
al la ondoj – blankan kreston,

al la humo – la fekundon,
al la T e m p o –la sekundon,
al la vento – fajfo-sonon,
al tropiko – varmo-zonon,
al polusoj – krudan froston
al la V i v o -- mortokoston.

Mahadeva, la pradio,
revis nun pri rava io.
De lilion li deŝiris,
al ĝi sian penson spiris
Kaj ĵetinte ĝin en maron
li atentis la ondaron...
La lilio lante flosis,
ondlulate ĝi ripozis,
sed subite el ondkresto
rave levis sin sen vesto
kiel lilio blanka,
kiel ondoj rapidlanga,
kiel B e l o kordetrua:
V i r i n e t o la U n u a.
Borden kuris ŝi senpeka,
eĉ mirakle – tute seka.
(Ho, de tiam, jen fatalo,
ke virino el skandalo
ĉiam venas – tute seka;
nur la viro restas – peka.)

Mahadeva, la pradio,
ŝin aprobis per ĝojkrio:
„Mi revo korpiĝinta,
ci sukcesis admirinda!
Ciaj Ĉarmo kaj naivo
estu la ridet’ de l’ V i v o!”
Pri destino li konsentis:
„Jen eĉ dio komplimentis!
Bela estas mi, tre bela,
en la mondo eĉ plej bela!”
Paradante kiel pavo
paŝis ŝi kun vanta gravo,
ŝi agnoskas sen aplombo:
„Nu, beletas ankaŭ mondo!”
Sed kiam la tago pasis,
la feliĉo ŝin forlasis;
tedis ŝin la muta miro,
kaptis sin je V o ĉ’ – sopiro.
Ŝi komencis jam lamenti,
al la dio iris plendi:

„Mahadeva, dio granda,

al Ci venis mi plendanta!
Honte je dia pretiĝo
min muelas – malfeliĉo!
Bela estas mi, tre bela,
ne ekzistas ja pli bela,
sed nenio ĝin prifestas...
Aĥ, mi malfeliĉa estas!”
Mahadeva pensis, pensis
kaj la mankon tuj kompensis,
kaj li kreis – kantobirdojn
por laŭdigi ŝiajn virtojn...
Korkaresaj kantoj ekis,
ŝin flatante ĉie eĥis.
Pasis ne pli – duontago,
jen incitis ŝin imago,
ke glorado ne sufiĉas.
La virino relamentis,
al la dio jene plendis:

„Mahadeva, dio granda,
al Ci venis mi plendanta!
Bela estas mi, tre bela,
la prefekto subĉiela...
Distras min la birdotrililo,
sed min pikas – maltrankvilo.
Kia belo estas tio,
se imitas ĝin nenio?”
Mahadeva pensis, pensis
kaj la mankon tuj kompensis;
jen kreigis – parodio
pri virino – la simio.
Ĝi imitis kaj grimacis...
La komiko al ŝi plaĉis.
Dum ĝi ŝin, ŝi ĝin imitis,
la virino ĝoje ridis...
Pasis ne pli -- kvarontago,
instigate de l’ imago
ŝi kuregis al la dio
plende peti lin pri io:

„Mahadeva, ĉiopova,
revas mi pri io nova!
La simuio, birdotrililo
ne sufiĉas por trankvilo.
Pensu, estas mi tre bela,
ne ekzistas la pli bela,
tion Ci mem devis senti
kaj post kreo komplimenti.
Superombro Cin kompreno!
Mankas al mi ĉirkaŭpreno!

Mahadeva pensis, pensis
kaj la mankon tuj kompensis.
Milde sible kiel tento
jam alglitis la – serpento.
Al ŝi flate, peton solve
sin ĝi premis ĉirkaŭvolve.
„Nu, jes, estas tre feliĉe,
sed... -- ŝi kriis – nesufiĉe!”
Do al dio ŝi rekuris,
plendis, petis, eĉ postulis:

„Mahadeva, plenpotenco,
por la Belo konsekvenco,
ke ĝi vekas ja – envion!
Nun mi devas timi ĉion.
Mia belo admirata
devus esti eĉ gardata,
ĉar atenco min ektrafus,
se defendon mi ne havus”.
Mahadeva pensis, pensis
kaj la mankon tuj kompensis,
donis li por ŝi patronon
tuj kreinte la – leonon...
Ĝi ŝin sekvis ĉiupaŝe,
kaj tremigis. Ŝi do kaŝe
jam decidis fari finon,
ne plu havi ĉiam timon.
Kiam pasis – unu horo
kuris ŝi al la Sinjoro
kaj komencis tuj lamenti,
ree peti, ree plendi;

„Mahadeva, dio granda,
min, ho, estu kompatanta!
Min mi sentas mallibera!
La leono, tre danĝera,
Ne nur firman gardon donas,
sed ĵaluze min spionas.
Pensu, min nenio amas
kaj mi por nenio flamas!
Se Ci donis al mi koron,
donu al ĝi – kortrezoron!”
Mahadeva pensis, pensis
kaj la mankon tuj kompensis,
ĉar ne pasis eĉ sekundo,
jen aperis – eta hundo.
La virino ridis, ĝojis,
dum la hundo flate bojis,
salte dancis vostosvinge
kaj kuradis ronde ringe.

Ŝi jubilis el korfundo
„Cin mi amas, ĉarma hundo!”

Pasis ne pli – kvin minutoj,
kaj ŝanĝiĝis la kondutoj,
ĉar deziri ŝi ne povis,
tutan mondon teda trovis.
Jen ŝi prenis do bastonon,
batis hundon kaj leonon...
Hundo boje truj rifuĝis,
la leon' foire muĝis.
Ŝi nun ĉiam pli kolere
furioze plu forpele;
ŝi ekdraŝis kiel lenton
la simion kaj serpenton...
Sible la serpent' forglitis,
la simio forrapidis.
Senindulge en arbaron
pelis ŝi eĉ la birdaron
kaj ĉagrene – kion fari? –
Lasis ŝi sin terenfali
kaj ekploris senkonsola
ĉar ŝi restis tute sola:

„Mahadeva povoriĉa,
estas mi tre malfeliĉa!
Mi kondukis... jes, kaprice...
Nu, ne tro, sed jen malice
ĉiu besto nun forestas...
Fakte tio jam atestas,
dum ekzistas vol' libera,
vanos esti – la plej bela.
Por mi kreu beston tian
(ĝi ne havu volon sian),
kiu devus al mi flati,
kiun rajtos mi eĉ bati!”
Mahadeva strebis pensi,
„kiel mankon nun kompensi?”
Fine – ĝentilhome cede –
kreis beston li laŭpete,
eĉ la plej humilan specon
(ne la viron) nur la – edzon.

(Julio Baghy: Ĉielarko – Antologio de fabeloj – Libro originale verkita en Esperanto –
Originale en versoj reverkitaj – J.Régulo Eldonisto LA LAGUNA DE TENERIFE – MCMLXVI)

Ildikó Király, sinjorino Dr. Vu



Ildikó estas la nepino de Király Lajos, la nomdonanto de nia amika rondo. Ŝi naskiĝis en familio por kiu la interna ideo estis memkomprenebla afero kaj kiu abundis en internaciaj rilatoj. Ŝia avo

enkondukis ŝin en Esperanton kiam ŝi estis nur 6 jara kaj helpis ŝin skribi leterojn al ŝia unua korespond-amiko. Post lia morto, la dua persono, kiu instruis ŝin, estis la ĉarma Márta Vári, kiu mem estis iama

studento de ŝia avo.

Post ŝia abiturienta ekzameno en Gimnazio Földes (Miskolc), ŝi daŭrigis siajn studojn en Eötvös Loránd Universitato, Budapest, kie ŝi studis hungaran, anglan kaj esperantan lingvojn kaj literaturojn. Ŝia

profesoro de Esperanto estis D-ro István Szerdahelyi, la internacie bonkonata lingvisto. Ŝi diplomiĝis en 1976; la temo de ŝia diplomlaboro estis la poezio de Julio Baghy.

En la sama jaro ŝi estis invitita de la Nowrich Jubilea Fonduso por partopreni la Britan Landan Kongreson en Chester, kie ŝi estis la gast-prezetanto. Ŝi pasigis 3 monatojn tie, vojaĝante de loko al loko,

donante prezentaĵojn pri interlingvistiko, Esp.literaturo kaj Hungario. Elstaraj poet(in)oj gastigis ŝin, ekzemple Dr-ino Marjorie Boulton, Albert Goodheir kaj William Auld. La intervjuoj, kiujn ŝi faris kun ili,

poste estis publikitaj en la gazeto „Hungara Vivo”. Ŝi ankaŭ estis intervjuita de sufiĉe multe da anglaj gazetoj, kiel kuriozulo alvenanta de trans la „fera kurteno”.

Nun, kelkajn vortojn pri ŝia kontribuo al Esperantujo. Ŝi estis kunlaboranto de la Szerdahelyi/Koutny vortaro, tradukis novelon de Mátyás Iván por la Hungara Antologio, faris librocenzojn, dum kelkaj

jaroj sekretariis la grupon de ekzamenistoj en HEA, ekzamenis Esperanton ankaŭ en la kadro de ŝtataj ekzamenoj (ELTEI-ITK) kune kun S-roj Jáki, Pechán kaj aliuloj, gvidis kursojn por studentoj kaj

ankaŭ por pedagogoj, ktp..

Ŝi estas la asista profesorino de la Universitato de Miskolc, Lingvoinstruanta Centro. Ekde 1977 ŝi instruas lingvojn, ĉefe la anglan. Ŝia edzo ankaŭ estas asista profesoro de la sama universitato. Ŝi estas

kontaktebla je kiralyildiko@freemail.hu

Iván Mándy

(1918–)

[Pron.: i!va:n ma:!ndi.] *Unu el la plej individu-voĉaj kreantoj de la hungara prozo post la liberigo. Liaj historioj okazas preskaŭ senescepte en la periferiaj kvartaloj de Budapeŝto, liaj rolantoj estas karakterizaj figuroj de tiu ĉi medio: ambiciaj simpluloj, plumpaj friponoj, sencelaĵaj vaguloj, kiujn li prezentas ĉiam ame kaj kunsente. Lian prezentmanieron karakterizas foje kvazaŭ naturalisma precizeco, aliffoje songa ŝvebado, fandanta ĉion liriko kaj atmosfero. En liaj verkoj havas elstare gravan funkcion rememoroj: kiam ili aperas, la aktuala paliĝas, kaj la pasinto malgraŭ siaj malkompleteco kaj opala malklaro kvazaŭ viviĝas.*

La mortinto

Griza, novembra mateno. Rubkolekta ĉaro klakbruas sur la strato István. La ĉevalo taktotene balancas la kapon. Ĝi estas dormema, laca. La stratpurigisto diligente laboras. Li movas sian balailon en duonrondoj, foje-foje li haltas. Li suprenŝovas sian ĉapon sur la frunto. Li kraĉas kaj daŭrigas la balaadon. Venas la komizo de la spicvendisto, kun granda korbo sur la brakoj. En ĝi estas laktobotelo, pano, butero. Li mem estas gaja. Lia larĝa vizaĝo ridetas. Li fajfas. Li malaperas malantaŭ pordego. Laboristoj marŝas kun malgrandaj paketoj subbrake; ili ne parolas.

Sur la alia flanko de la parko la arboj nude krutas al la ĉielo.

Poste krako, simila al tre subita brua faligo de skatolkovrilo.

La stratpurigisto ekmalfermas la buŝon, interrompas sian laboron. Unu el la laboristoj – grandliphara viro – subite haltas pro konsterno.

Nu?!

Flavsurtuta viro kuregas tra la parko. Li premas la pugnon al sia brusto, kiel maratoniisto.

Iu ŝrikas.

La laboristoj, la stratpurigisto kuras al la parko. Antaŭ ili kuras studento kun akto sub la brako.

– Tio estis pafo – iu diras.

La flavsurtuta viro jam haltis sur la ludplaco. Li kaj verdkostuma virino kliniĝas super benkon. Du dismetitaj piedoj elpendas inter ili. Nigra vintra surtuto, kun termalpurigita orlo.

Ili ĉirkaŭstaras la benkon. Scivolemaj, ekscititaj vizaĝoj kliniĝas antaŭen.

Sur la benko, duonrenversite: viro. Lia kapo antaŭenkliniĝis sur la bruston. Liaj okuloj estas suprenkroĉigitaj. Li gapas kun vana, senesprima rigardo.

El la amaso da homoj bluvejna mano etendiĝas antaŭen. Ĝi karesas lian frunton, fermas liajn okulojn.

– Li mortis.

Estas silento por iom da tempo.

– Rigardu, kiel spasme li premegas tiun revolveron.

– Korpafo?

– Eble. Li estis ankoraŭ juna. Nur iomete griziĝas la haroj ĉe la tempioj.

– Eĉ ĉapelon li ne havas.

– Necesus iel apogi lin. Kuŝigi sur la benkon.
 La virino kaj la flavsurtuta viro prenas lian kapon, du laboristoj liajn piedojn.
 – Tiel, do – ŝi murmuretas. – Nun vi povas kuŝi, patreto. Fari tiun . . .
 – Jen, kiel lia mentono defalis!
 – Necesus informi la policon.
 Unu el la laboristoj kapjesas: – Ho, jes.
 Neniu moviĝas. La virino tiradas la ŝultrojn.
 – Ĉu sbiro? Kial? Ne urĝas. Kion li povus fari al li?
 La studento nur gapadas, sur lia vizaĝo sidas teruro, liaj lipoj tremas. Demando eksplodas el li:
 – Sed kial?
 – Tion oni ne povas scii.
 Nun la virino parolas. Ŝia ŝminkita vizaĝo estas lila, la pudro gluiĝis sur ŝian nazon. Ŝi foje staras per unu piedo, poste per la alia, ŝi tiradas la piedojn.
 – Mi venas el festeno, kaj tiu ĉi (ŝi montras al la mortinto) iras antaŭ mi. Li kliniĝadas, ofte haltas. Nu, mi pensas, ĉi tiu havas iom da vaporo en la kapo. Mi posttrovas lin, eble mi povas petegaĉi cigaredon de li. Kaj li eksidas sur tiun ĉi benkon, jen. Li kliniĝas antaŭen, foje leviĝas, foje sinkas liaj ŝultroj. Li skrapadas en la poŝo, poste subite: bum! Kia malvarmo! Li havas normalan vintran surtuton. Se mi havus tian, mi eĉ ne pensus mortpafi min. Mi ne estus tiom freneza!
 – Li aspektas ĝentilhoma ulo – diras la grandliphara laboristo.
 La studento metas sian aktujon antaŭ la piedojn de la mortinto.
 – Iu devas rigardi, kio estas en liaj poŝoj. Eble el tio ni povos ekscii ion.
 – Nu, jes, sed kiu rigardu?
 La flavsurtutulo mansignas.
 – Kiu? Jen, mi! Kio estas en tio? Li estas mortinto, do mortinto. Li ne batos mian manon.
 – Tio ja certas!
 Kelkaj el ili ridas.
 La krina mano jam serĉadas en la poŝo de la surtuto.
 – Jen, cigaredo! Ĝi estas iom disrompita. Bona tabako.
 La virino elstreĉas la manon.
 – Donu ĝin al mi, patreto.
 La viro ridaĉas.
 – Kia deziro! Ĝi utilos por mi. – Li metas ĝin en la superan poŝon de sia surtuto, kaj turniĝas al la aliaj. – Ĉu damaĝas lin se mi forprenas ĝin? Li neniam plu fumos.
 Li serĉadas plu. La sekva trovo estas blua koverto. Li elprenas la leteron. Li legas. – Kara Paĉjo! Mi sciigas vin, ke mi bonsane alvenis, kaj fartas tre bone. La lago Balaton ankaŭ nun estas tre bela. Ni havis prunajn buletojn por la hieraŭa tagmanĝo, kaj mi manĝis dekdu. Onjo Irma mesaĝas, ke . . .
 La viro kapneadas.
 – Ĉi tie ĝi ne estas legebla. Infanskribo. Āgi. Tiu estas la subskribo. Balatonalmádi, la 26-an de novembro.
 – Do, li estas patro – iu diras. – Kaj li mortpafas sin. Nun kio okazos al la filineto?
 – Jes, la sinjoro eĉ ne pensas pri tio – murmuris la laboristo. – Venas ia virineto, kokras lin, kaj tuj la revolvero.
 – Kiu povas esti tiu onjo Irma? – demandas la virino.
 – Certe ia onklino. Tien oni sendis la knabinecon.
 – Li eble ne estas malbona homo, li eĉ nun kunportas la leteron. Li certe legis ĝin multfoje.

– Ni rigardu, kio estas ankoraŭ ĉi tie – diras la flavsurtutulo.
 – Ia aĵo, nu, kiel ĝi nomiĝas? Fajfilo. Sed vane mi provas fajfi.
 Li metas la malgrandan, cilindroforman fajfilon al sia buŝo. Li snufas, spiregadas, klopdas ĉiel, sed li ne sukcesas eligi eĉ unu sonon.
 – Jen mi! – ridas la virino. – Tiel oni devas tion fari.
 Ŝi pependas, kiel birdo.
 – Jen, rigardu, rigardu – diras la flavsurtutulo, kaj jam interesiĝas pri certajtoj. – Monujo. Eĉ kiel bela. Ĝi havas formon de hufofero. Superba aĵo. Estu silento, finfine! – li krias al la virino, kiu denove pependas.
 – Do, kaj kiom enhavas tiu monujo? – demandas la laboristo. – Ĉar tio estas grava.
 – Estas ĉi tie iom, amiko. Flaru ĉi tien! Bankbileto de kvin. En la ena fako bileto de dudek. Kaj kiom da moneroj! Rigardu!
 Li tenas la malfermitan monujon en la mano, tintigas la monon. Lia malriĉa, maldika montra fingro serĉadas en ĝi.
 – Tion oni jam ne rajtas forpreni, kvankam ĝi estus bonvena. Mi povus aĉeti puloveron, ŝtrumpojn por mia filo. Alvenis jam vintro, kaj li apenaŭ havas ion. Tiom da mono, kaj ĝi apartenas al mortinto!
 Li ĝemas.
 – Sed je diablo, iu havas tiom da mono, kaj mortigas sin! – kriegas la laboristo. – Sinjoroj, kion do tio signifas?! Mi ne havas surtuton, ne povas hejti, mi apenaŭ manĝas ion, kaj mi vivas! Tiu ĉi estas dika je mono, kaj . . . Ho, mizera vivo!
 – Li havas infanon!
 – Decajn vestaĵojn!
 – Kaj, rigardu, ĉi tie li kuŝas.
 La mono ekscitis ilin. Al la mortinto ili kriegas ĉiun plendon de sia mizera vivo.
 – Mi estis elhejmigita!
 – Mia patro ne kapablas pagi lernokotizon, mi eĉ ne eniros la lernejon jam!
 – Mia brusto fajfas kiel tuta orkestro!
 – Tamen ni devas vivi! Por tiu ĉi la tuto signifas nenion. Li forĵetas sian vivon, kiel ĉifonon. Ĝi estis teda, ĉu? Vi ne sciis kian torton manĝi, en kiun teatron iri?!
 La rondo pli kaj pli malvastiĝas. La situacio aspektas kvazaŭ oni volus ekbati la mortinton.
 – Nu, mi remetis la monujon – diras la flavsurtutulo. – Li lastfoje karesas la bankbileton de dudek. – Jen, havu vian monon plu.
 Kaj denove, refoje ili komencas demandi:
 – Sed, kial do?! . . .
 La mortinto ja nur kuŝas kviete, liaj manoj pendas sub la benkon, li ne respondas.

(*Ildikó Király*)

**La traduko aperis en la Hungara Antologio, eldonita de eldonejo Corvina, en 1984.
La novelon de Iván Mándy, esperantigis Ildikó Király sinjorino d-ro Vú, membro de la
Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”.**

TIBOR SEKELJ

TEMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO

Tradukis Terezija Kapista

La titolo de la originalo TEMUDŽIN – DEČAK STEPE
- Parto Kvara -

Tatara venĝo

Kiel la verkisto de „Sekreta Historio de Mongoloj” antaŭ sepcent jarojn notis – Dio pardonu lian animon – Jisugej ekkuregis al la lando de Tataroj. La mateno estis freŝa malgraŭ sunbrilo. Nenie estis eĉ pasero, aŭ hamstro, nek iu ajn vivestaĵo videblis, sed la sprita stepa rajdanto tiel al kutimiĝis al soleco, ke li tion eĉ ne rimarkis.

Tamen io premis lian koron. Li timis renkonti Tatarojn, malnovajn malamikojn de lia familio. Tiu renkontiĝo certe ne bone estus finota por li..

Jisugej bone rememoras la lastan renkontiĝon kun Tataroj.

Okazis tio dum unu konflikto en kiu lia kamaradaro venkis grupon da Tataroj. Mem Jisugej el tiu bataleto kondukis du kaptitojn. Kiam li hejmenvenis, ĵus tiam estis lia edzino naskanta la unuan filon. Li nomis la filon Temuĝin, kio estis la nomo de unu el kaptitoj.

Tio estis mongola kutimo, sed ne ankaŭ tatara. Por Tataroj tio signifis grandan ofendon, kiun ili neniam povis pardoni al li. Pro tiu okazaĵo Tataroj sopiris revenĝon kaj tion Jisugej bone sciis.

La horoj pasadis. La rajdanto jam fintrinkis sian ladbotelon da kumiso, kaj nun denove soifis, kaj kiu scias kie li povos denove sattrinki. Li sciis, ke en proksimeco rivero ne ekzistas.

Sed subite, je sia granda ĝojo, li ekvidis grupon da homoj sidantaj ĉirkaŭ la fajro kiuj regalis sin per kumiso kaj ŝafviando. Li alproksimiĝis kaj post ĝentila saluto eksidis inter ili.

Laŭ la stepa kutimo, la homoj bonakceptis kaj gastigis lin, ne demandante ion ajn, kion li mem ne deziras diri. Sed laŭ la parolmaniero kaj vestaĵo ili tuj povis scii, el kiu regiono li estas. Ŝajnas ankaŭ, ke unu el la ĉeestantoj eĉ rekonis lin.

Ankaŭ Jisugej volus scii, kun kiuj li sidas, sed same al ili, laŭ stepa kutimo, estis malpermesitaj demandoj. Almenaŭ li sciis, ĉu troviĝas inter malamikoj aŭ amikoj!

Ĉar la suno jam estis subiranta, la dommastroj proponis al li resti kaj tranokti ĉe ili, Jisugej akceptis tion. Ĉar tendoj ne ekzistis, ili dormis subĉiele envolvitaj en lankovriloj kaj kiteloj.

Matenon, Jisugej adiaŭis ilin kaj ekrajdis tra stepo al sia regiono.

Posttagmeze atinginte sian hejmon, li eksentis doloron en stomako. Li stumbladis dum enirado al jurto kaj tuj ĵetis sin sur liton. Estis lavita de ŝvito.

Lia edzino Hoelun tuj rimarkis, ke io ne estas en ordo. Haste kuiris puran teon kaj komencis masaĝi lian korpon, kiu pli kaj pli doloris. Sed li pleje suferis de stomaka spasma. Tiam estiĝis ĉio klara al li. La Tataroj venenigis lin.

- Hoelun, iru rapide kaj venigu Monglik-on, apenaŭ elparolis.

La edzino forkuris kaj baldaŭ rekuris kune kun Monglik, parenco kaj konfidenculo de Jisugej.

La parenco eksidis sur liton de li, peze spirante kun granda zorgo survizaĝe.

- Monglik, filo mia, mi estas mortanta. Tataroj dumvoje venenigis min kaj al tio ĉi helpo ne ekzistas. Sed vi promesu al mi, ke vi prizorgos mian vidvinon kaj la infanojn.

Tien li haltis, fermis la okulojn pro la forta doloro kiun li eksentis. Poste li tute mallaŭte daŭrigis:

- Iru ĝis Olkunoutoj prenu mian plej aĝan filon, Temuĝin tuj revenu kaj zorgu pri familio. Estas li nun la plej aĝa viro.

Tiuj lastaj vortoj almenaŭ ne aŭdeblis. Tuj poste li fermis la okulojn kaj ekdormis poreterne.

Monglik ekis al vojaĝo, foren ĉirkaŭante la Tataran teron por eviti enfalon al iu ajn kaptilo. Morgaŭan tagon atinginte la jurtejon de Olkunoutoj estis facile al li trovi la jurton, en kiu troviĝis Temuĝin.

Al Monglik ne facilis sciigi la tristan novaĵon al Temuĝin kaj al Dejseĉeno, dommastro la ĵurfrato de forpasinto. Tiu longe sidis kun fiksita rigardo teren, antaŭ ol ion ajn diri. Peza estis la penso pri tio, ke ne plu ekzistas tiu forta kaj saĝa homo, kiu nur antaŭ kelkaj tagoj ĉi tie sidis kun li. Fine li koncentriĝinte ekparolis:

- Filo Temuĝin, malfacile estas la nuna momento al vi. Vi devos hejmen transpreni la respondecon al si, pri la tuta familio. Sed vi estas kuraĝa kaj sagaca junulo, mi scias, ke vi elturniĝos.

Temuĝin sidis kun mallevitaj okuloj kvazaŭ embarasita. Dejseĉen post iom da paŭzo daŭrigis:

- Dum tiu ĉi mallonga tempo mi ekamis vin kaj kunvivis kun penso, ke vi estiĝos mia bofilo. Sed se la sorto tion alimaniere ordigos, ni estas senpovaj kontraŭ ĝi.

Monglik prenis vorton por eldiri kion li sentis sur lange:

- Se estas permesita al mi, ke mi miksiĝu en viajn aferojn, se mi povus paroli je la nomo de Temuĝin, mi petas, ke vi ĉion tion ne taksu kiel rompon de fianĉiĝo. Mi esperas, ke la aferoj solviĝos kaj Temuĝin denove revenos por sia fianĉino.

- Bopatro mia, estimata Dejseĉen, diris la knabo vi estis al mi vera patro dum ĉi tiuj tagoj. Mi ekamis vin – tie la haltis kaj rektiĝis daŭrigante. Kaj Borte mia fianĉino estas pli bela ol iu ajn knabino, kiun mi vidis. Mi revenos por ŝi, kiam ajn, bopatro, gardu ŝin por mi. Mi scias, ke atendas min multaj malfacilaĵoj...tie li iomete singultis...sed mi batalos.

- Estu tiel, se la sorto tiel volus! – respondis la dommastro kaj frapetadis surŝultren la knabon.

Post kelkaj minutoj la du rajdantoj eksaltis selojn. Temuĝin kun sia lasta rigardo serĉis la etan Borte, kiu alvenis kaj staris tremigita, kiam vidis sian forirantan fianĉon. Ŝi mansvingis al li, kaj al Temuĝin ŝajnis en ŝiaj okuloj brilis iu aparta brilo, kiun li antaŭe ne rimarkis.

Kun okuloj mallarĝe kunpremitaj, kutimantaj rigardi la stepajn forojn, Borte rigardis kiel Temuĝin estiĝas pli kaj pli malgranda, ĝis kiam de ambaŭ rajdantoj videblis nur nubeto da polvo, fine ankaŭ tio malaperis en la kurbiĝo inter du montetoj, de kie antaŭ kelkajn tagojn ekaperis Temuĝin kun alia rajdanto. Sed nun temas pri io tute alia. Kiom ĝojplena kaj esperiga sstis la alvenado, tiom estas necerta kaj trista la nuna foriro.

*Dura stepa tero,
morna nubvetero,
nigras monto, horizonto,
koron premas efemero,*

dum trenfluas fridrivero.

*Stepo ĝemas sub galopoj,
en ĉielo cent nubopoj,
svarmas aro da demandoj:
Al rokmonto pri estonto,
al rivero pri espero.*

La familio ŝajnis senkapigita, kvankam la juna Temuĝin klopodis, li ne sukcesis teni la grandan familion kune. Sen la renoma Jisugej, la parencoj, kiuj ĝis tiam vivis kune, unu post alia forlasis la jurton de Temuĝin. Ili kunprenis la servistojn, la brutaron kaj forportis ĉion porteblan. Fine Temuĝin restis sola kun la patrino, fratoj kaj fratinetoj kaj naŭ ĉevaloj, kiam ili estis lasitaj al li.

La patrino ĉiutage iradis al proksima arbaro kolekti manĝeblajn berojn kaj foliojn, kiujn ŝi povis prepari kiel manĝaĵon. La knaboj fiŝkaptadis per hokoj, kiujn ili mem faris el kudriloj.

Tie-ie ankaŭ hamstro enfalis ilian kaptilon kaj tiel malriĉece ili nutris sin.

Sed la familio en sia soleca jurto ne estis senespera, Ili povis sin tiel longe nutri, ĉar en rivero Onon estas multaj fiŝoj kaj la arbaro ĉiam renoviĝis kaj donacis siajn berojn.

Sed ĝuste tia, ilia trankvila vivo komencis ĝeni la aliajn. La najbara gento tajĉiuta ne estis kontenta. Al la gentanoj malplaĉis tio, ke kvankam malriĉa, la familio ne pereis tute, kiel ili tion esperis. „Se tiu ĉi familio pereus” – cerbumis ili – „nia teritorio ankoraŭ plivastiĝus tiom, ke ĝiaj limoj estus nenie videblaj en horizonto.”

Post ne longa konsultado la Tajĉiutoj decidis ataki la familion de Temuĝin.

Ĝus kiam rimarkinte la rajdantojn alvenantajn kun malamika intenco, la familio haste kunprenis la plej bezonatajn havaĵojn, forlasis la jurton kaj kun kelkaj restantaj ĉevaloj eskapis en proksiman arbaron.

Ili esperis, ke la densa arbaro ilin protektos de la malamikoj. Tio povus esti tiel, se la malamikoj ne estus tiel obstinemaj en siaj malbonintencoj.

- daŭrigo sekvas -

Nova estraro de Hungaria Esperanto-Asocio

Mi informas vin karaj legantoj, ke la 15-an de novembro 2008a, la kunsido de delegitoj de la hungarlandaj esperanto-grupoj elektis novan estraron por la Hungaria Esperanto-Asocio.

La nova prezidanto estas: Imre Szabó..

Li estas fama poeto, arta tradukisto de diversaj libroj, kaj de poemaro de nia nacia poeto József Attila, krome li estas la prezidanto de la Esperanto-Ekzameniga Komitato de la budapeŝta universitato ELTE.

La membroj de la prezidantaro estas:

s-ro József Baksa

s-ro József Eszényi

s-ro Ferenc Harnyos

s-rino Andrea Horváth

s-rino Klára Mikola

s-rino Enikő Sereghiné Zengő

Al la nova prezidanto, ni Hungaroj deziras multan sanon , animan kaj korpan forton por plenumi la aron da esperantomovadaj taskoj. Rilate inter ili :la kontaktotenojn kaj ties konstruojn kune kun la diversaj organizacioj en- kaj eksterlande, krome la ĉiurilatan plian nivelaltigon de nia esperanto-movado. De la estraranoj ni atendas, ke ili helpu grandmezure nian novan altestimatan prezidanton, ke la tuta estrara kunlaboro kreu sukceson por nia Hungaria Esperanto-Asocio.

Por atingi tiun sukceson, ni deziras al la tuta estraro multe da sano, kompreno kaj bonvola kunagado.

Adrienne, sinjorino Pásztor

László Pásztor

Historio de la esperanto movado en urbo Miškolc

- X-a parto -

Agado de la miškolca „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo en 2008

La 2-an de januaro la geedzoj-Pásztor el Miskolc kaj Teodor Andreas, reprezentanto de Esperanto de Košice salutis la novan jaron kaj deziris por Esperanto-movadoj de ambaŭ landoj kaj de la mondaj multe da sukcesoj.

La 20-an de februaro Jozefo Bakša tiama prezidanto de HEA kaj Jozefo Dudáš (nia amikrondano) organizis rondtablan paroladon en miškolca kafejo. Tie duona membraro de nia Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” fondis novan esperanto grupon de HEA. Ties gvidanto estas s-ro Jozefo Dudáš. Pri ilia esperanto-movada agado kaj pri kunvenoj ni ne havas informojn, sed ties membraro escepte ties estron, ĉiam partoprenis la aranĝaĵojn de la EAR „Király Lajos”. La movadan kaj literaturan laboron de la EAR „Király Lajos” helpas 37 tiuj geesperantistoj el la mondo, kiuj estas membroj de aliaj eo-kluboj. Tiel estiĝis nia Esperanto-Amika Rondo vera Internacia Esperanto-Amika Rondo. Nia Amika Rondo ekde septembro de 2005 redaktas sian revuon Nordhungaria Informo, en kiu movadaj, literaturaj kaj ceteraj temoj aperas.

La 4-5-6-an de aprilo – ni povis akcepti 50 membran polan (esperantistoj kaj ne esperantistoj kune) grupon kiuj konatiĝis kun Miškolco kaj ties ĉirkaŭaĵo. Estrino de la grupo estis Halina Komár, prezidantino de la Pola Esperanto-Asocio. La renkontiĝo havis amikan etoson. La gastoj estis kontentaj. Ili ricevis esperantlingvaj kaj pollingvaj informilojn pri la vizititaj lokoj de Abaújszántó kaj Miškolco. Eĉ ili povis partopreni pollingvan meson en Miškolco.

La renkontiĝo estis ege bona propagando por Esperanto antaŭ la neesperantistoj. Al la organizado de la gastoakcepto, donis altgradajn fakajn konsilojn kaj lingvan helpon D-ro Endre Dudich, honora membro de UEA. La neesperantistajn polajn gastojn pole salutis je la alveno, kaj ĝis la fino ĉeestis d-ro Georgo Nanovfszky, la alia honora prezidanto de HEA. Pri la grandsukcesa renkonto aperis artikolo en la revuo ESPERANTO (organo de UEA), verkita de s-ino Halina Komar, prezidantino de PEA.

La 27-28-29-an de junio, la geedzoj Pásztor partoprenis Renkontiĝon de la Fervojiŝta Esperanto Asocio, en la transdanuba urbo Tata. Dank’ al la organizantoj la tuta programo estis eminenta. En la urbo tiutempe okazis la „Akvo-muziko-floro” festivalo. Partoprenis la renkontiĝon ĉeĥoj, poloj, aŭstroj kaj slovakoj. Malgranda urborigarda veturilo estis al dispono de la gastoj, pere de tiu la organizantoj prezentis interesaĵojn de la urbo. La koniga teksto estis esperantlingva. Ni vizitis ĉevalfarmon, arboreton, zooĝardenon, ĉaromuzeon de Bábolna.

D-ro Jozefo Bacsárdi interpretis esperantlingve por la eksterlandanoj la hungarlingvan prezenton de la fremdulgvidanto..

Okazis ankaŭ vingustumado kaj vino, kvizo estis.

Antaŭ la dormejo Esperanto-flago atentigis, ke en la urbo okazas Esperanto-aranĝaĵo.

La 7-8-9-an de julio, dum aranĝo de IRIS en Szolnok la miŝkolcan Esperanto-Amikan Rondon reprezentis la geedzoj Pásztor. Estis surpriza, sed ege agrabla, ke la partoprenantoj nur esperantlingve paroladis, neniuj uzis sian nacian lingvon. Unu el la plej interesaj programoj estis la Esperanto-kurso por komencantoj, kio okazis laŭ la Ĉeh-metodo. Ties instruisto estis sr-o Stanislaw Mandrak eksprezidanto de PEA, kiun pasintjare gastigis la Amika Rondo. Li estas talenta pedagogo, kiu tre bone instruas.

En Szolnok estis interesa la ekspozicioj de la belartistoj, kie ni povis miri portreto-pentraĵon pri L.L.Zamenhof. Tie ni konatiĝis kun diversnaciaj esperantistoj: svisino, poloj, rumanianoj, serbino (Terezija Kapista).

La renkontiĝo havis amikan etoson.

La 20-21-22-23-an de aŭgusto la geedzoj Pásztor partoprenis Esperanto-kongreson de PEA en urbo Lodz, kiun oni aranĝis okaze de la centjara datreveno de PEA. Post la malfermo kaj Esperanto-himno sekvis prelego pri la Pola Esperanto-Movado kaj pri organizo de la 2009-jara bjalistoka

Esperanto-Kongreso. Dum la kulturprogramo poemoj de J.Tuwim, pola poeto estis deklamitaj kaj prezentis sian programon la koruso EĤO. Vizito estis en la juda tombejo kaj sinagogo. Dum urborigardo ni rigardis la palacon de Edward Herbst kaj fabrikon de Lodwik Geyer, kio estas nun tekstilindustria muzeo. Vespera programo estis la koncerto de Feliks akompanate de piano. Tiun sekvis la BI-BA-BO ensemble.

Estis interesa la Palaco de Poznanski kaj la Manufakturo, kie estis trovebla la Esperanto Informa Stando.

Estis esperantlingva meso en iu romkatolika preĝejo de Lodz.

Ni ĝuis kantojn de Zúza Kornicka per gitaro akompanate.

Estis speciala la koncerto de JOMO, kiu sole kantis, gitaris diversajn popolajn kantojn. Efike de tiu ankaŭ la partoprenantoj komencis danci.

D-ro Ilona Koutny raportis ege detale pri la instruado de Esperanto, kiu daŭras en Universitato „Adam Miczkievicz” de urbo Poznan.

Ni tre ege povis ĝoji, ke ni festis kune kun niaj polaj =geamikoj la 100-an datrevenon de la Pola Esperanto-Asocio.

La 17-an de septembro estis inaŭgurita Esperanto- libroekspozicio, =el tiu okazo, ke ĉi-jare 100-jara estas UEA, 95-jara estas la miŝkolca Esperanto-Movado (lingvoinstruo), kaj 25-jara estas la Memorĉambro de D-ro Kolomano Kalocsay en urbo Abaujszántó. Loko de la esperanto-libro-ekspozicio estis la miŝkolca „II.Rákóczi, Ferenc” Departamenta Biblioteko. La ekspozicion inaŭguris D-ro Georgo Nanovfszky. Kun li kaj kun s-ino Adri Pásztor, la Miŝkolca Urba Televido faris intervjuon, kiun samtage oni prezentis al la estimata publiko. Al la ekspozicio certigis materialon: UEA, László Gadoŝ, Landa Fremdlingva Biblioteko- el la Kolekto „Fajszy”, Eŭgeno Jósŭvai kaj geedzoj Pásztor. Partoprenis la ekspozicion ankaŭ D-ro Árpád Máthé, estrarano de Kalocsay-Societo, kaj Ilona Bóde kiel reprezentantino de la Landa Fremdlingva Biblioteko, same el Budapeŝto.

Ĉi-jare ni havis agrablan surprizon, ĉar nian peton plenumis la Urbeŝtraro de Miŝkolco, ke estu prinomita iu Avaŝ-monta ŝtuparo en Miŝkolco, pri D-ro Ludoviko Győry Nagy, amiko de D-ro Kolomano Kalocsay. Ĉi tiel la ŝtuparo apud la pordego de Reformata Tombejo sur

monto Avaŝ, ricevis nomon de la menciita esperantisto, kiu estis estro, prezidanto de la miŝkolca kaj Borŝod-Abauj-Zemplén Departamenta Esperanto-Komitato de jaro 1960 ĝis 1980, ĝis lia morto. Li ripozas en la menciita kalvinana tombejo.

La 27-an de septembro okazis kadre de la Vinrikoltaj Tagoj de Abaujszántó festo de 25-a datreveno de Memorĉambro de D-ro Kolomano Kalocsay. La urbestro, Lászlóné Pásztor kaj Jozefo Eszényi salutis la ĉeestantojn, poste Stefano Nagy popolkantisto kantis du poemojn de Aleksandro Petófi, hungara poeto, kiujn tradukis D-ro Kolomano Kalocsay. El Abaujszántó, kvar lernantinoj - de la instruistino Ildiko Széphalmi - esperantlingve deklamis du versajn fabelojn de D-ro K. Kalocsay ĉe busto de li. Samideano Attila Makay el Nagyvárad (Oradea) diris siajn pensojn en la strateto de D-ro Kálmán Kalocsay kaj deklamis Dojno titolan poemon de Mihail Eminescu: rumana poeto, laŭ traduko de D-ro Kalocsay.

En la tombejo de Abaujszántó s-ino Adrienne Pásztor deklamis modernan varianton de la bela preĝo Patro nia, ĉe tombo de patrino de D-ro Kolomano Kalocsay

La 20-an de septembro en vilaĝo Tállya okazis Renkontiĝo de la enlandaj Popolkantogrupoj. Tiun partoprenis korusoj de Sellye, Zalakomár, Pálháza, Abaujszántó, Nyírlugos kaj Érpatak. Ĉi tie ni spertis, ke inter la partoprenantoj de la renkontiĝo estas tre ege kunte na forto. Ĉi tiu devas esti por ĉiuj societoj bona ekzemplo, ĉar ĉiuj povas atingi rezulton, nur pere de komuna, malegoisma laboro

En la 2005-2008-jaroj, - do ekde la rekomenco - daŭre instruas la internacian lingvon Esperanto, la malsupraj gesamideanoj:

Maria Busai, s-rino Stefano Fedor, D-ro Jozefo Halász, Ladislao Kövér, s-rino László Szmekankó. Ili partoprenas kune kun iliaj gelernantinoj niajn aranĝaĵojn.

La naŭan kaj dekan partojn verkis kaj esperantigis: László Pásztor

Rimarko

Mi informas vin, ke al nia revuo uzatajn, sed per nomo de la fotanto nesignitajn fotojn ni aplikis el la hungara Vikipedio aŭ el la Google.

Adrienne s-rino Pásztor

Karaj niaj legantoj!

Veras, ke ni estis infanoj jam antaŭ multaj jaroj, kiam ni lernis pri la besto-vivularo. Ekde nun, vi povas konvinkiĝi, kiom multe scias la SKEF kaj SKEJ membroj pri la ĉevaloj. Verki tiun ĉi poemon kaj traktadon, donis eblecon la Kreinta kolektivo de SKEF, SKEJ en Slovakio, kiu pasigis kelkajn tagojn en **KREIVA METIEJO**, kie oni bredas ĉevalojn. Bonvolu akcepti ĉi vere eminentajn verkojn de la aŭtoroj:

Ĉevalo – homa sklavo

Ĉeval-dorso multe portas

Li ja malfacile sortas.

Tiras, obeas, servas

Nu kaj fine – fine ĝi mortas.

Nenia honoro, nenia honesto

Tia ja sorto... de l' ĉeval' besto.

Peter Baláž

Andreas, Teodor; EK Košice

Lernejaj ĉevalaĵoj de lernanto Moriĉjo

Traktado pri la ĉevalo

La ĉevalo (*Equus Caballus*) estas unu el la plej bone konataj bestoj. La ĉevalo estas granda besto, precipe komparante ĝin al la hundo, kato kaj muso. La ĉevalo estas hejma besto, simile, kiel la hundo, kato, kaj muso. La ĉevalo estas pli granda kaj peza besto, ol kune la hundo, kato kaj muso. Ni rigardu do ĝian detalan priskribon.

En dimensio horizontala la ĉevalo komenciĝas per buŝego, daŭriĝas per kapo, kolo, dorso, postaĵo kaj finiĝas per vosto. La signifo de la kapo estas granda, ĉar sur ĝi troviĝas du grandaj okuloj kaj du viglaj oreloj, moveblaj antaŭen kaj malantaŭen sendepende unu de la alia. Tiamaniere la ĉevalo povas aŭskulti kaj tion, kio jam estas forpasinta kaj samtempe tion, kio estas venonta. Per buŝego la =ĉevalo manĝegas – ĝi estas vegetarano. Tiu-ĉi fakto estas grava por la rajdanto, kiu ne devas timi, ke la ĉevalo – ekmalsatante – formanĝas lin.

La kolo de la ĉevalo estas signifa tial, ke sur ĝi troviĝas la longa ĉeval-hararo-diference =de ni homoj, kiuj portas hararon surkape. La dorso de la ĉevalo estis kreita por surmeti tien la selon; tio servas al la rajdanto – mallertulo, ke li ne falu teren. Por pli granda certeco li povas enŝovi siajn piedojn en piedingojn, kiuj pendas ambaŭflanke de la selo.

La signifon de la postaĵo mi ne pritraktos, ĉar mi estas deca knabo. La vosto de la ĉevalo servas por forpeli la arogantan muŝaron.

En dimensio vertikala la ĉevalo komenciĝas per dorso, sekvas du flankoj kaj finiĝas per piedoj: 2 antaŭaj, 2 malantaŭaj, 2 dekstraflankaj kaj 2 maldekstraflankaj. La piedoj estas tiome longaj, ke ili eĉ atingas la tersurfacon. Ĉiu piedo finiĝas per HUFUO. Ĉar ĉiu piedo finiĝas per unu hufu, la ĉevalo apartenas al grupo de NEPARHUFULOJ, diference ekzemple de la bovino, kiu estas DUHUFULINO. La hufu estas farita el kornmaterio kaj ne havas nervajn fibrojn. Tiu-ĉi fakto estas tre grava por la forĝisto, kiu dum hufferumado de la ĉevalo ne devas timi, ke la besto piedbato lin pro doloro. La =hufferumado estas farata tiel, ke la forĝisto ardigas pecon da fero en fajro, kurbigas ĝin laŭ la formo de la hufplato kaj almetas la ruĝe ardantan ferpecon sur la hufon de la besto, poste alfirmigas ĝin per kelkaj – terure longaj – hufnajloj. Tiu procedo, malgraŭ ĝia terura aspekto, estas por la ĉevalo tute sendolora, simile, kvazaŭ ni farus pedikuron. Post mallonga tempo nia amiko la ĉevalo povas iradi, kuradi, saltadi sen rapida difektiĝo de hufoj sur la malmola tero.

La nutraĵon, kiun ricevas la ĉevalo, oni nomas FURAĜO kaj krom herbo kaj fojno ĝi konsistas ankaŭ el diversaj cerealaĵoj, fruktoj kaj legomoj. Per kelkaj pecoj da karoto vi povas la ĉevalon ĉiam sukcese korupti...

La plej konata furaĝo por ĉevaloj estas la aveno. En la historio de aŭstra-hungara monarĥio onidire okazis, ke la hungaraj bienposedantoj-nobeluloj ribelis kontraŭ la reĝino, kiam ŝi postulis de la nobelaro imposton en formo de aveno por la reĝa kavalerio, ili skribis al la reĝina moŝto leteron kun latinlingva teksto:” Vitam et sanguinem, SED AVENAM NON!” Mi ne scias, kiel finiĝis la afero, ĉar poste mi unu semajnon ne vizitadis la lernejon pro gripo.

La nuntempe granda besto en la praepoko ne estis tiome granda, sed estis nur kiel pli granda hundo. Dum la jarmiloj de evoluo ĝi elkreskis kaj nun ne povas okazi eraro, ke la rajdanto erare sursidus hundon, anstataŭ ĉevalon.

Tiu besto ludis ege grandan rolon en la homara historio. Se ne estus ĉevaloj, en nian geografian spacon ne estus povintaj alveni diversaj amasoj da turistoj el Azio: Hunoj, Avaroj, Tataroj, Hungaroj kaj Turkaj. Se ili estus devintaj fari tiun ege longan vojon perpiede, kun multe da gruzo, kun virinoj kun kofroj kaj infanoj – do, koran dankon! La utileco de ĉevaloj ne elĉerpiĝas per konkerado de fremdaj landoj. Krom la portado de rajdanto oni povas ĝin jungi al ĉaro kaj porti diversajn gruzojn tien kaj reen. Kelkfoje unuope, kelkfoje duope ili tiras la ĉaron. En nia moderna tempo ja tiun taskon transprenis aŭtomobiloj. Ilia tasko en

militservado kaj agrikulturo ankaŭ malkreskis. Oni prefere uzas traktorojn, ĉar por traktoroj estas haveblaj rezervaj partoj, sed por ĉevaloj ne.

En nia tempo la ĉevalo fariĝis precipe sportistoj, ili ricevas diversan ekipaĵon por tiu celo: selon kun piedingoj enbuŝaĵon, gvidrimenon, diosciaskion kaj povas komenci la vetkurado kun transsaltado de obstakloj.

Onidire la ĉevalo estas nobla besto, ĉar ĝi rifuzas trinki akvon el malpura sitelo. Mi ankaŭ estas – laŭ tio – nobla besto.

La reproduktadon de la ĉevalaspeco jam ne prizorgas ili mem, sed estas specialistoj, zooteknikistoj, kiuj faras tion anstataŭ la virĉevalo. Tiu homo estas nomata, „ensemigisto”.

Dank'al li naskiĝas la ĉevalidoj.

Pri la senpera ligo de la ĉevaloj kun la homa kulturo atestas multaj proverboj. Ekzemple:

- 1, Ne esploru la dentaron de ĉevalo donacita (=ne estu scivolema pri ĝia aĝo)
- 2, La ĉevalo havas kvar piedojn, kaj tamen stumbas, (ni do pardonu erarojn al homo, kiu havas nur du piedojn)
- 3, Tiu ĉevalo ricevas pli da bato kiu pli bone tiras, (=ne estas inde troigi la laborklopodon)
- 4, Bona ĉevalo meritas nutraron per bona pano (ĝi meritis esti portata sur manplato, se ĝi ne pezus tiom)
- 5, Komuna ĉevalo havas vundkovritan dorson, (=pri la komuna havaĵo neniu zorgas tre konsciencie, ĉiu nur eluzi klopodas. Hungara proverbo)
- 6, Granda estas ĝia kapo, malgaju do la ĉevalo! (=invitado de malgaja amiko en drinkejon. Hungara diraĵo)
- 7, Ĉevalon, pafilon kaj edzinon pruntedonu al neniu. (Arabaj proverboj)
- 8, Kiu aĉetis ĉevalon, prenas ankaŭ enbuŝaĵon.
- 9, Rapida, belega ĉevalo kaj bona edzino plilongigas la vivon.
- 10, La feliĉo de viro signifas varman hejmon, bonan edzinon kaj rapidan ĉevalon.
- 11, Bona ĉevalo jungita kune kun azeno – iros do kiel azeno.
- 12, Se vi havas ĉevalon, do rajdu!

Pri la granda estimo koncerne de la ĉevaloj atestas ankaŭ tio, ke la fizika unuo de forto estis nomita: ĈEVALPOVO . Hodiaŭ la aŭtomobilaj motoroj enhavas kelkdek, ĝis kelkcent ĉevalpovojn. Sed la aŭtomobiloj ege malpurigas la vivmedion per aĉaj gasoj kaj aliaj forĵetaĵoj. Ĉe la ĉevaloj validas la principo de reciklado de materio: la formanĝita furaĝo post ĝia digestiĝo reaperas en formo de „ĉevalcitronoj”, kiuj estas efike uzataj en ĝardenkulturado. Tiel ni povas rikolti ekzemple pli grandajn fragojn, pli belajn florojn.

Vivu la ĉevaloj!

(La Traktado...estas aperigita =permesite de la redaktoro Jan Vajs-la 18-an de novembro 2008a)

(Moriĉjo Apfelbaum, lernanto de la sesa klaso/Plena Ilustrita Ĉevalo Eldonita de **ESPERO** por **LEK** /de Liptova Esperanto Klubo, Slovakio/)

BONDEZIROJ

Karaj niaj legantoj!

Okaze de rapida alproksimiĝo de Kristnasko kaj la Novjara datreveno, bonvolu permesi, ke por Vi ĉiuj ni deziru la plej bonajn kiujn vi deziras por vi mem. Sed el inter la plej bonaj ni elstarigas la bonsanon, la pacon, amon, komprenon, la prosperon de nia lingvo Esperanto! La samon ni deziras al loĝantoj de tiu bela loko de ESPERANTIO, kiu estas trovebla en Brazilio, kaj nomiĝas BONA ESPERO. Tie, krom la portugala, la alia oficiala lingvo estas la Esperanto! Ni legis antaŭ nelonge, la libron titolita BONA ESPERO. Ĝin verkis tiu eminenta

pola verkisto-ĵurnalisto Roman Dobrzyński, kies verko estas ankaŭ la libro: Zamenhof strato. La libron BONA ESPERO mi proponas legi al la Esperanto-lingvon jam konantaj homoj, kaj mi certigas vin, ke ĝi estas vere ĝuata legindaĵo.

La bondeziranto estas: Adrienne sinjorino Pásztor, nome de la Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”

Ni petis nian karan samideanon d-ron Ferenc Jáki, bonvolu alparoli niajn karajn gelegantojn, okaze de la venonta Nova Jaro. Li respondis: „kion mi al mi diras, tion mi diras al ĉiuj”

D-ro Ferenc Jáki Mi al mi diras

Via vivo ne hastiru.
Paŝi lante ekdeziru.
Pri ĉiel' helblua miru.
Florokampon eksopiru.
Por vi turdo bele trilu.
Ag' abela vin inspiru.
Al petant' kompate iru.
Al kadukaj nur ĝentilu.
Al virinoj kavaliru.
Neon al ili ne diru.
Nur modere manĝdeziru.
Dolĉan vinon nun akiru.
Belajn versojn elkompilu.
Viaj bild', statu' gracilu.
Belon diri, ho, aspiru.
Latinkanto vin inspiru.
Viaj jaroj ore brilu.
En ekzist' anim' jubilu.
Via viv' al tut' similu.
Festan vivon ne ekzilu!

**ĜOJPLENAN KRISTNASKON KAJ FELIĈAN NOVAN JARON AL ĈIUJ
BONVOLAJ HOMOJ SUR LA TERO!**





NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>